## Kaj ankoraŭ io...

Se vi loĝas apud levponto, aŭ iam vidis levponton, respondu ambaŭ demandojn. Se vi neniam vidis levponton, respondu la duan demandon:

1. Priskribu la scenon ĉe levponto, kiun vi iam vidis aŭ ofte vidas.
2. En kiuj landoj troviĝas multaj levpontoj? Elektu unu el tiuj landoj kaj verku kelkajn frazojn pri ĝi.

**Ĉapitro ses: La ŝipo forveturas**

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kiel nomiĝas la ŝipestro? Kiel nomiĝas la subŝipestro?...Do, proponu amuzan nomon por li.
2. La estro diris: "Ni iru rapide." Kial ili devis rapidi?
3. La lasta cilindro venis al la ŝipo. Kial tio estis problemo?
4. Kiel ili solvis la problemon?
5. Kiu kredis, ke la nova observisto ne estas tre inteligenta?
6. Kion vi opinias pri la inteligenteco de la du maristoj? Kial vi opinias tion?


## Demandoj ne pri la rakonto:

**1.** Kiu estas la nomo de la haveno kiu troviĝas plej proksime al via do- mo? Ĉu tiu haveno estas en via lando aŭ en najbara lando? Ĉu tiu ha- no estas en via urbo aŭ en alia urbo? Ĉu tiu haveno estas videbla de vi- domo? Ĉu venas multaj ŝipoj al tiu haveno? El kiuj landoj ili venas? Ĉ- venas la fervojo al tiu haveno? Ĉu estas multaj pontoj en tiu haveno? Ĉ- vi ofte vizitas tiun havenon? Per kio vi veturas al ĝi? Kio estas videbla ĉ- tiu haveno?

**2.** Kiaj konstruaĵoj estas videblaj apud havenoj? Kiaj maŝinoj estas vi- deblaj apud havenoj? Kiaj varoj estas videblaj apud havenoj? Kiaj pe- sonoj estas videblaj apud havenoj? Kiaj eventoj okazas apud havenoj? Kiaj bruoj estas aŭdeblaj apud havenoj?

**3.** La observisto estas en la observejo ĉe la supro de la dudek metra masto. Kaj li timas pro la alteco. Ĉu vi timus, se vi devus grimpi al la supro de alta masto? Pro kio alia vi timas?

**4.** Ĉu vi timus en ĉi tiaj situacioj?... Kion vi farus?




## Ekzerco mult-manka:

*Maldekstre troviĝas dek du frazoj. Al ĉiu frazo mankas unu vorto. La mankantaj vortoj troviĝas en la dekstra kolumno, sed en malĝusta ordo. Metu la vortojn en la spacojn por produkti gramatike ĝustajn, memstare kompletajn frazojn:*

| | |
|---|---|
| 1. Post dudek ........ ili mallevos la ponton. | meti |
| 2. Ni nun havas ........ problemon. | sur |
| 3. En 1642 Kristoforo Kolumbo ......... Amerikon. | direktojn |
| 4. La holdo estas .......... | minutoj |
| 5. La lasta cilindro staros .......... la ferdeko. | estas |
| 6. Ili morgaŭ .......... la ponton. | trovis |
| 7. Estas spaco apud la .......... raketoj. | libron |
| 8. Ili ne povas .......... la cilindron en la holdon. | grandan |
| 9. Ni vidis multajn .......... ŝipojn. | mallevos |
| 10. Li .......... en la observejo. | avertaj |
| 11. Mi serĉas mian .......... | grandajn |
| 12. La Zaklap nomis tri .......... el kvar. | plena |

## Kaj ankoraŭ io...

*Kristoforo Kolumbo famiĝis, ĉar li trovis Amerikon. Kial famiĝis la jena personoj?...*

| | | |
|---|---|---|
| Hans Christian Andersen | Brigitte Bardot | Marie Curie |
| Ludwig van Beethoven | Galileo Galilei | Henry Ford |
| Alexander G. Bell | Richard Burton | Juri Gagarin |
| Miguel de Cervantes | Don Helder Camara | Charles Chaplin |
| Johann Wolfgang Goethe | Mahatma Ghandi | Pablo Picasso |
| Jean François Champollion | Johannes Gutenberg | Edmund Hillary |
| Martin Luther King | Nikolao Koperniko | Frank Sinatra |
| Wilhelm C. Röntgen | Guglielmo Marconi | Julius Nyerere |
| William Shakespeare | David Livingstone | Fridtjof Nansen |
| Robert Falcon Scott | Albert Schweitzer | O.kaj W.Wright |
| Neumann János | Niel Armstrong | Ludoviko Zamenh |

**Ĉapitro sep: Danĝero ĉe la levponto!**

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kion vidis la edzo en la komenco de la ĉapitro?
2. Kial li kriis "Tio estas stranga!"?
3. Kial Lev serĉis la ŝanĝostangon? Por kio oni uzas ŝanĝostangon?
4. Kial li ne tuj trovis la ŝanĝostangon?
5. La edzo aŭdis novan bruon. Kio ĝi estis?
6. Kiuj venis al la ponto en la sama momento? Kial ili venis en la sama momento?
7. Se la geedzoj mallevos la ponton, kio okazos?
8. Se la geedzoj ne mallevos la ponton, kio okazos?
9. Kiu parolis logike kaj rapide? Pri kio?
10. Kiu parolis pli logike kaj rapide? Pri kio? Kion decidis la edzo?
11. Kio nun estas sekura? Kio estas ankoraŭ en danĝero?



12. Kial Lo Zaklap ne vidis la ponton?

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Decidi:*

1. Ĉu vi ofte devas fari malfacilajn decidojn? Pri kio vi ofte devas decidi? Pri kio vi povas facile decidi? Pri kio vi malfacile povas decidi? Ĉu vi kutime decidas per logiko? Ĉu vi rapide aŭ malrapide decidas? Kiuj personoj faras multajn decidojn? Kiuj personoj faras malmultajn decidojn? Kiuj personoj faras malbonajn decidojn?

*En la sama momento...*

2. Kio okazas, se trajno kaj ŝipo venas al levponto en precize la sama momento?
3. Kio okazas, kiam du personoj en la sama familio volas uzi la telefonon en la sama momento?
4. Kio okazas, kiam du personoj en la sama familio volas rigardi du malsamajn televidajn programojn en la sama momento?
5. Kio okazas, kiam vi saltas en la ban-kuvon kaj la telefono sonas en la sama momento?
6. Kio okazas, kiam du katoj vidas unu muson en la sama momento?
7. Kio okazas, kiam rusa kaj usona kaj ĉina spacraketoj venas al la sama loko sur la surfaco de Marso en la sama momento?
8. Kio okazas en bela semajnfina tago, kiam ĉiu aŭtomobilisto en via urbo decidas iri kun sia familio al la plaĝo en la sama momento?

## Ekzerco malkovra:

Sube troviĝas listo de frazoj. Kovru ĉiun frazon krom la unua. En la dekstra kolumno troviĝas instrukcio por ŝanĝi parton de la maldekstra frazo. Diru laŭte la ŝanĝitan frazon kaj tuj malkovru la suban frazon por kontroli, ĉu vi ĝuste adaptis la frazon. Tiel progresu malsupre ĝis la fino de la listo. Kontrolu, kiom rapide vi kapablas senerare tralegi la tutan

liston. Se vi lernas en grupo, trovu kiu grupano plej rapidas. Kontro
unu semajnon post via unua provo, ĉu vi kapablas pli aŭ malpli rapi
tralegi la liston.

| | |
|---|---|
| La ŝipo estas en la haveno. | ...venas al... |
| La ŝipo venas al la haveno. | ...la ponto. |
| La ŝipo venas al la ponto. | La trajno... |
| La trajno venas al la ponto. | ...foriras de... |
| La trajno foriras de la ponto. | ...la stacidomo. |
| La trajno foriras de la stacidomo. | ...la domo. |
| La trajno foriras de la domo. | ...fajfas apud... |
| La trajno fajfas apud la domo. | ...la fenestro. |
| La trajno fajfas apud la fenestro. | ...estas... |
| La trajno estas apud la fenestro. | La koko... |
| La koko estas apud la fenestro. | ...krias... |
| La koko krias apud la fenstro. | ...dormas... |
| La koko dormas apud la fenestro. | La profesoro... |
| La profesoro dormas apud la fenestro. | ...en la lito. |
| La profesoro dormas en la lito. | ...en la ĝardeno. |
| La profesoro dormas en la ĝardeno. | La hundo... |
| La hundo dormas en la ĝardeno. | |

## Kaj ankoraŭ io...

Por kio oni uzas ... raketon, cilindrojn, ŝipojn, pontojn, observisto telefonojn, librojn, trajnojn, kuiristojn, dokumentojn, laŭtan bruon, ma tojn, ankrojn, vekhorloĝojn, mapojn, sonorilojn, paperon, kokin hundojn, katojn, holdojn, logikon, kuirejojn, fumon, tablojn, staci mojn, malinteligentajn personojn, inteligentajn personojn? Por kio o ne uzas ... raketojn, sonorilojn, paperon, ŝipojn, pontojn, pordojn, li brojn, nomkartojn, petrolon, vekhorloĝojn?





## Demandoj pri la rakonto:

1. Kial falis la observisto? De kie li falis? Kien li falis?
2. Kion kriis la observisto dum li falis?
3. De kiu direkto venis la danĝero? Kial la observisto ne vidis la danĝeron?
4. Kio estis en la cilindro? Kial la observisto kredis, ke estas nokto?
5. Kio okazos, kiam la idioto lumigos alumeton apud la petrolo?
6. Ĉu vi ankoraŭ dubas, ke Lo Zaklap estas idioto?

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Fali:*

Ĉu vi iam falis de biciklo?...de arbo? de ĉevalo aŭ alia besto?...de tegmento?...el via lito?...de barilo?...de trajno?...en trajno?...en ŝipo?...en via domo?...en via ĝardeno? Parolu pri kiam vi aŭ unu el viaj amikoj falis. Ĉu vi iam iris al hospitalo pro falo? Ĉu vi iam falis en cilindron de petrolo?

*Korekti:*

Ĉu vi ofte korektas la parolojn aŭ skribaĵojn de aliaj pesonoj? Ĉu aliaj personoj ofte korektas viajn opiniojn aŭ skribaĵojn? Ĉu vi estas feliĉa, kiam alia persono korektas vian laboron aŭ opinion? En kiuj profesioj oni ofte korektas? Kiel oni povas korekti la agojn aŭ pensojn de personoj? Parolu pri kaj bonaj kaj malbonaj ekzemploj de tio.

*Averti:*

Kial troviĝas avertaj raketoj sur ŝipoj? Kiel kaj kiam oni uzas ilin? Kiel oni avertas pri alvenonta ŝtormo? Kiujn avertojn oni donas al persono, kiu vizitas ŝipon? ...kinejon? ...bibliotekon? ...minejon? ...marbordan strandon? ...la lunon? Pri kiuj naturaj katastrofoj ni ne povas ricevi averton? Pri kiuj ni ja povas ricevi averton?

## Ekzerco seria:

*Kompletigu la seriojn:*

| | |
|---|---|
| 1. sudo, oriento, okc.... | 6. unu, tri, ses, dek, .... |
| 2. flava, blua, verda, .... | 7. julio, aŭgusto, s.... |
| 3. du, kvar, ses, ok, .... | 8. kvar, ok, dek ses, .... |
| 4. vintro, somero, aŭ.... | 9. dekstre, m........, supre, .... |
| 5. lundo, mardo, m.... | 10. kvar, naŭ, dek ses, .... |

## Kaj ankoraŭ io...

Jen dek treege malbonaj rimiĝantaj duliniaj poemetoj. Sed la organi zitaj amantoj de la Esperanto-poezio provis certigi, ke ĉi tiuj versaĉ neniam aperu sur presita paĝo. Iliaj agentoj sukcesis forviŝi la lasta vorton de ĉiu liniparo. Ĉar ĉiu mankanta vorto rimiĝas kun la lasta vort en la linio super ĝi, vi povas rekompletigi la poemetojn, kaj tiel retroiri la evoluon de la Esperanto-poezio je almenaŭ dek jaroj... Imagu!

1. Kursas ĉi tio en ĉiu semajno,
   Sed ĉu ofte vi veturas per.........?
2. Jen transportilo kun tre multaj tipoj,
   Rondiras la mondon la pli grandaj.........
3. Vesto malgranda estas jaketo,
   Spac-veturilo estas.........
4. Speco de frukto estas la piro,
   Speco de homo estas la.........
5. Tunelojn ni uzas, por trairi montojn;
   Transiri riverojn? Ni uzas nun.........
6. Aŭdu la voĉon, ĝi tre bele sonas,
   Kies ĝi estas, ĉu ŝi.........?
7. Kion faras la knabo? Diru, mi petas,
   Li eniras butikon, kaj nun li.........



8. Observisto fuŝis, granda la malordo,
   Direkton li forgesis, temis pri la.........
9. Nigra? Ĉu estas nokto? Ĉu estas fumo?
   Jen alumeto! Venos baldaŭ la.........
10. Observisto observis kun tro da malhasto,
    Li ne vidis ponton, kiun trafis la.........

### Ĉapitro naŭ: La eksplodo!

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kion diris la subŝipestro?
2. Kio okazis al li dum li diris tion?
3. Kial estas tre malmultaj demandoj pri ĉi tiu ĉapitro?

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Flugi*

1. Ĉu plaĉas al vi rigardi aeroplanojn? Ĉu plaĉas al vi flugi per aeroplano? Ĉu vi iam flugis per aeroplano? Ĉu vi ofte flugas per aeroplano? Ĉu vi kutime flugas per modernaj aŭ malmodernaj aeroplanoj? Rakontu pri flugo en aeroplano.
2. Ĉu vi iam flugis per aerŝipo?...per balono?...per glis-aviadilo?...per kajto? Se ne, ĉu vi ŝatus tion fari?
3. Ĉu vi povas nomi birdon, kiu ne povas flugi (...krom pasero ligita al briko!) Ĉu vi povas nomi beston, kiu ne estas birdo, sed kiu povas flugi? (...krom hipopotamo en aeroplano!)
4. Ĉu estas flughaveno apud via domo? Ĉu plaĉus al vi loĝi apud flughaveno? Kiu estas la nomo de la flughaveno plej proksima al via domo? Ĉu vi ofte vizitas ĝin? Ĉu vi ofte forflugas de ĝi? Ĉu venas al ĝi grandaj aviadiloj? De kie? Kio estas videbla tie?

## Ekzerco alternativa:

Jen mallonga rakonto, sed en kelkaj lokoj vi devas elekti inter du pr
ponoj. Nur unu el la proponoj estas gramatike ĝusta. Bv. elekti tiun:

La najbaro alvenis kaj diris: "Vi faras (bona laboro/bonan laboron)
"Jes," respondis la (laboranto/laboranton): "Mia tegmento nun estas
(bona stato/ bonan staton). Mi (riparis/reparis) ĝin. Pluvas ofte kaj est
(necese/necesa) havi bonan tegmenton. En ĝi estis multaj truetoj. Mi ir
al la (butikoj/butikojn) (hieraŭ/morgaŭ) kaj mi aĉetis (traboj/traboj
por la skeleto kaj (tegoloj/tegolojn) por (kovri/kovras) la tuton. Mi lab
ris dum ok (horoj/horojn) kaj nun ĝi estas (perfekte/perfekta)." Subi
flugis tra la aero subŝipestro, kiu (frapis/falis) la novan tegmenton. E
(ĝi/ĝin) nun troviĝas unu tre granda truo!

## Kaj ankoraŭ io...

En la diversaj lingvoj oni esprimas naturajn sonojn per malsamaj lit
roj. Ekzemple ni lernis en ĉapitro du, ke nederlandanoj nomas kok
krion "Kukeleku", francoj "Kokoriko", germanoj kaj italoj "Kikirik
hungaroj "Kukuriku", kaj britoj "Kokadudildu".

**1.** En ĉapitro naŭ ni esprimis la sonon de la eksplodo per "BAM"
Ĉu estas aliaj vortoj por la sono de eksplodo en Esperanto? Trovu ili
Kiel vi skribas la sonon de eksplodo en via lingvo? En kiom da aliaj lin
voj vi povas trovi la skribajn formojn por eksplodo?

**2.** Trovu la skribajn formojn por la sonoj de bestoblekoj kaj p
aliaj bruoj en diversaj lingvoj. Verŝajne necesos korespondi kun lerna
toj de Esperanto en aliaj landoj aŭ viziti internacian renkontiĝon.



## ROL-LUDO: FRAPO ĈE LA PORDO (por kvin personoj)

Jen nia dua rol-ludo, jam por kvin personoj. La sceno estas domo sabat-matene. Paĉjo kaj Panjo Tudem estas hejme, Panjo lavas la vestajojn, Paĉjo sidas kaj legas ĵurnalon. Ili havas unu infanon, Nes, sed li ne ĉeestas. Aŭdiĝas sonorado ĉe la pordo, Panjo malfermas la pordon kaj tie staras elegantulo kun du valizoj... Poste du aliaj vizitantoj alvenas, unu post la alia; la gvidanto indikas, kiam ili eniru. Rolo A (la valizulo) estas detaligita sur paĝo 52, rolo B (la patrino) sur paĝo 102, rolo C (la patro) sur paĝo 140, rolo D (posta alvenanto) sur paĝo 153 kaj rolo E (la lasta alvenanto) sur paĝo 181.

## Vidu la diferencon!

*Kutime, oni volas, ke la diferenco vivu. Sed nun vi devas vidi la diferencon inter la du subaj bildoj. Estas dek diferencoj, priskribu ilin.*

